

Mario Pei

kaj interlingvistiko / Esperanto

Naskita en Romo, Italio, Mario Andrew Pei (1901-1978) estis fama usona lingvisto kun italaj radikoj, kaj konsiderata kiel unu el la grandaj poliglotoj de la 20a jarcento, kiu konis centon da lingvoj, de kiuj li aktive regis tridekon, precipe la italan, anglan, francan, hispanan, portugalan, rusan, germanan, latinan, antikvan grekon, mezepokan slavan kaj sanskriton. Elmigrante en 1908 al Usono, en Novjorko li vizitis diversajn specialajn lernejojn kaj trapasis ankaŭ jezuitan edukadon. En 1932 li doktoriĝis ĉe Columbia universitato per verkaĵo pri la lingvo de la oka jarcento en norda Francio. Restante fidela al la sama universitato, de 1952 ĝis 1970, Pei instruis kiel ĝia profesoro romanan filologion. Multnombre li publikigis diverstemajn verkaĵojn en kaj ekster la romanistiko, kiuj trovis vastajn fakajn signifon, atenton kaj aprezon. Liaj abundaj scioj kaj konoj pri lingvoj estis urĝe bezonataj kaj kondukis dum la dua mondmilito al la kunlaboro kun la ministerio pri defendo de la usona registaro (pli precize: Oficejo pri Milita Informado kaj Oficejo pri Strategiaj Servoj), kie li laboris kiel lingva konsilanto kaj aŭtoro de klerigaj tekstoj por usonaj soldatoj ĉe la diversaj militpunktoj de la mondo. Pei verkis kvindenkon da libroj. En 1943 aperis lia verko *Languages for War and Peace* en formo de gvidilo pri la sep plej gravaj lingvoj de la mondo kaj trideko da aliaj lingvoj. En 1941 li publikigis sian unuan libron pri la itala lingvo. Post tio sekvis *The Story of Language* (1949), *The Story of English* (1952), *The Story of Tedesco* (1952), *All about language* (1954), *Language for everybody* (1956), *Talking your way around the world* (1961), *How to learn languages and what languages to learn* (1966), *Double-speak in America* (1973), *The Story of Latin and the Romance Languages* (1976) kaj aliaj. Por fascini sian celpublikon, la talento de Pei respegulis la trajtojn de bona usona verkisto, kiu konsistas en tio, ke li kapablis interese priskribi sian fakan temon, en facila lingvaĵo kaj sen ideologia radikalismo, sektema fanatiko aŭ plumpa propagando, uzante multajn praktikajn ekzemplojn kaj interesajn kazoj.

La ĉefan kontribuon, kiun Pei postlasis sur la kampo de la interlingvistiko, estis lia ampleksa libro (291 p.) *One Language for the World*, kiu aperis en 1958 en la angla lingvo. Kvankam nuntempe apenaŭ plu uzata, legata aŭ citata, ĉi tiu libro devas esti taksita kiel 'klasika' scienca verko pri la problemoj de la internacia lingvo. Pro diversaj kialoj, kiujn Pei detale klarigis en sia leginda libro, la aŭtoro montris sin konvinkita, ke la homaro ne nur iam devus disponi pri komuna lingvo, sed ke la popoloj ankaŭ dezirus havi tian mondlingvon. Sed Pei ne naive konsideris la aferojn, sed restis realisto, kaj tolerema. Unuflanke, li kredis, ke tia mondlingvo povus multe kontribui al la paca internacia kunlaboro, ligita kun la libereco por la individuo, kvankam tia lingvo mem ne kapablu eviti internaciajn konfliktojn. Sed ĝi povus almenaŭ efike helpi eviti miskomprenojn en la komunikado kaj tradukado, subteni la sciencon kaj teknologion, helpi la literaturan lingvan evoluon, akceli la turismon kaj eĉ krei laborlokojn. Apartan utilon, kiun tia lingvo povus alporti, li vidis speciale por unuopaj multlingvaj ŝtatoj kiel Hinda Unio, Ĉinio, Indonezio, Filipinoj, Novgvineo, Haitio, Sovetunio, Svislando, Sudano. La ĉefa problemoj estus nur la metodo por elekti tian lingvon el 2796 naturaj lingvoj kaj el 600 konstruitaj lingvoj (li ne uzis la terminon planlingvoj): Ĉu do tiu komuna mondlingvo estu etna-nacia (natura) lingvo, ekzemple la mondvaste uzata angla, franca, hispana, ĉina aŭ rusa, aŭ ĉu ĝi estu la idiomato de

malgranda tribo, aŭ ĉu tiucele estu adoptita konstruita (artefarita, planita) lingvo kiel Esperanto, Ido, Interlingua aŭ Basic English?

Dum por ĉiuj ceteraj proponitaj konstruitaj lingvosistemoj Pei ne vidis iun ŝancon de realiĝo, Pei evidente esprimis certan simpatian por Esperanto, kies diversajn avantaĝojn li klare vidis. En 1973, Pei emfazis la propedeŭtikan valoron de Esperanto kaj rekomendis enkonduki ĝin en la instruplanojn de la lernejoj. Malgraŭ tiu favorado de Esperanto, lia skeptiko restis konservita.

Rimarkinde estas, ke Pei egalrajte traktis la etnajn-naciajn kaj konstruitajn lingvojn en siaj konsiderado kaj analizado de la rolo de mondlingvo. Lingvo, kiu servus nur al malgranda elito, kiu estus uzata nur kiel klasĉambra ekzerco aŭ kiu estus uzata sole de relative malmultaj ŝatantoj, laŭ li ne povus esti aprobita kiel mondlingvo. Tia mondlingvo devus almenaŭ funkcii en sama maniero kiel la angla en Usono aŭ la rusa en Sovetunio. Tia mondlingvo ankaŭ ne devus esti perfekta, aŭ facila lingvo, sed ĝi simple ludu la rolon de la “mondlingvo”. Krom tio, tia mondlingvo ankaŭ ne devus funkcii kiel principo aŭ intereso, sed nur kiel rimedo (angle: tool). Plej grave estus, ke tia mondlingvo ne estu akceptita nur de kelkaj, sed de ĉiuj. Inter la malavantaĝoj de la planlingva movado li menciis la diversajn tendencojn, kiuj kontraŭbatalas unu la aliajn. Alia ĝeno estis laŭ li la rigida insistemo de la interlingvistoj, kiuj krom konstruita lingvo ne vidas alian solvon de la “lingvoproblemo”. Ĉi tiun sintenon Pei kritikis kiel “Esperanto-naciismon”, aŭ “Interlingua-naciismon”.

Lia libro *One Language for the World* estis menciita en *Unesko-Kuriero*, n-ro 11, 1963, sur kies paĝoj Pei ricevis la okazon prezenti la planlingvan temon. Unue, li skizis la historion pri la provoj krei universalan lingvon por pritaksi ankaŭ la valoron de Esperanto, kiun li laŭdis kiel bonegan ekzemplon de fonetika lingvo. La fonetikecon kaj normigitecon de Esperanto li eĉ pli alte taksis ol ĝian laŭdiran neŭtralecon mem, se per tio oni komprenas la internaciecon de planlingvo. Al la aktualaj planlingvoj Pei riproĉis, ke ili ne sufiĉe konsideras la kreskantan signifon de la naturaj lingvoj, kiuj disvastiĝas kun la intenco fariĝi modernaj universalaj lingvoj. Pro la menciitaj avantaĝoj de planlingvoj, al kiuj apartenis laŭ li ankaŭ la manko de la danĝero de disdialektiĝo, Pei kredis, ke internacia konstruita lingvo kiel Esperanto estas tuj adoptebla, enkondukebla kaj utiligebla por la monda komunikado, dum la naturaj lingvoj devus unue reformi sian ortografion. Aprezante la kulturajn valorojn, kiujn Esperanto laŭ li jam kreas pere de sia praktika uzado, Pei ĝojis, se li povus konstati, se ĉirkaŭ tia planlingvo naskiĝus ankaŭ universala kulturo.

Pei apartenis ankaŭ al la redakta komitato de *la monda lingvo-problemo*, sed ŝajnas, ke de li mem artikolo neniam aperis en tiu ĉi fakrevuo, kiu estis tiam kontrolata de V. Sadler.

Pei pledis por praktika solvo de la “lingvoproblemo” kaj komparis por la angla lingvo, kiun adoptas pli kaj pli da popoloj, la situacion de la latina lingvo, al kiu en la antikva tempo la etruskoj, iberoj kaj gaŭloj transiris.

Konklude, la lingvisto Mario Pei kredis, ke la movado por mondlingvo havos iun ŝancon por sukcesi. Samtempe li atentigis, ke tiu sukceso forestos, se la registaroj de la mondo ne interkonsentos pri la enkonduko de konkreta lingvo. Krom tio estus neeble konvinki ĉiujn popolojn pri la absoluta supereco de unu el la ekzistantaj lingvoj, ĉu natura, ĉu konstruita.